# Jura Semajno

Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro 2 : 2025


## NULIGITA JUĜO EN BRITIO, ĈAR BLASFEMADO NE ESTAS KONSIDERATA KIEL DELIKTO




Hamit Coskun, turka civitano origine kurda kaj nun loĝanta en Britio, estis kondamnita en la monato junio pro la bruligo de Korano, la sankta libro de la islama religio, antaŭ turka konsulejo. Tamen, post apelacio, tiu juĝo ĵus estas nuligita, ĉar tribunalo konsideris ke S-ro Coskun ŝirmita de sia rajto je libera esprimado, rajtas eldiri eĉ ofendemajn opiniojn.

Kiel dirite, Hamit Coskun bruligis la sanktan islaman libron kaj li, samtempe, eldiris ofendajn vortojn kontraŭ tiu religio. Pro tio, li estis unuamomente kondamnita al pago de mon-puno. Tamen, apelacia tribunalo de Westminster konsideras nun, ke tiuj kritikoj eldiritaj de Coskun adresas al religio sed ne al ties sekvantoj. La tribunalo ankaŭ diris, ke kvankam bruligo de Korano povas esti konsiderata kiel ofendo por islamanoj, pli grava estas la protekto de la libera esprimado, eĉ se temas pri vortoj konsiderataj kiel ofendoj por kelkaj homoj.

Robert Jenrick, sekretario pri Justico, post koni tiun juĝon diris, ke li kontraŭas bruligon de libro, tamen ĉi tiu agado ne povus esti konsiderata kiel delikto. Laŭ li, ebla kondamno pro esprimo de opinioj, eĉ se konsiderataj de kelkaj homoj kiel blasfemo, ne povas esti akceptata ĉe jura sistemo, kiu malaperigis leĝojn kontraŭ blasfemado en la jaro 2008. Tiel, kontraŭ-religiaj protestoj devas esti tolerataj de ĉiuj, ankaŭ de kredantoj.

# Vorto de la Semajno

**DELEGI**

Sendi iun, kiel reprezentanton.

*La prezidanto delegis ambasadoron ĉe la kuveno.*

**Delegito:** Persono, kiun iu delegis.

**Delegitaro:** Tuto de la delegitoj.

Sinonimoj: *reprezenti, deputi, komisii.*



# Internacia kalendaro

**17-an de oktobro**: *Internacia tago pri elradikigo de malriĉeco.*

**18-an de oktobro**: *Internacia tago pri la protekto de la naturo.*

## *NOVA NUMERO DE JURA TRIBUNO INTERNACIA ANTAŬ LA JAR-FINO*

Ni jam komencis redakti la venontan numeron de *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de nia asocio kaj la sola revuo en esperanto pritraktanta jurajn temojn.

Ĉiuj interesitoj povas kunlabori pere de artikolo, eseo, informoj, fotografaĵoj k.s. se ili rilatas al juraj temoj.

Do, ne hezitu sendi al ni viajn kontribuaĵojn.

jurista@esperanto.ac
www.esperantojuro.org

# *Kiel juristo, kion vi opinias?*

Sur la pasinta numero de nia revuo *JURA TRIBUNO INTERNACIA,* ni pritraktis la principon *"Ne-sciado de leĝo ne ekskuzas ties plenumadon"*.

Laŭ ĝi, normo promulgita kaj publikigita devas esti ĉies konata kaj tio ja sufiĉas por ties nepra plenumado. Do, ebla ne-kono de tiu leĝo ne povas esti argumento aŭ ekskuzo por pravigi ties ne-plenumadon.

Sur la revuo eĉ proponis realan situacion al legantoj.

Imagu: Usona stiranto vojaĝas al Usonaj Virgulin-insuloj, dependa teritorio de Usono en la Kariba Maro. En Usono veturiloj cirkulas tra la dekstra flanko de stratoj kaj ŝoseoj, tamen en la teritorio de Usonaj Virgulin-insuloj, trafik-flanko estas la maldekstra, pro eksa brita influo. Tiu usona turisto decidas lui aŭtomobilon por koni la insulojn, sed li bedaŭrinde okazigas akcidenton kiam li cirkulis tra la dekstra flanko de ŝoseo.

Li argumentas, ke li tute ne konis tiun normon de la Usonaj Virgulin-insuloj, laŭ kiu oni devas cirkuli tra la maldekstra flanko. Li eĉ asertas, ke kiel usona stiranto sur teritorio dependanta de Usono, prave supozis, ke la trafik-flanko estus la dekstra. Krome, li mencias, ke la Ĝeneva Konvencio pri Trafiko postulas (art. 9-a), ke ene de lando la trafik-flanko sur stratoj estu sama.

Ĉu estus akcepteblaj liaj argumentoj? Kion vi opinias?

Atentu, la plej bonaj opinioj aperos sur la venonta numero de *Jura Tribuno Internacia*.

